

BRAZILA ESPERANTISTO

60-A JARO

SEPTEMBRO - DECEMBRO 1966

N.º 630-633



Lia Ekscelenco la Prezidanto de la Respubliko, Marŝalo Humberto de Alencar Castelo Branco, estis la Honora Prezidanto de la 19-a Brazila Kongreso de Esperanto. Li afable respondis kun akcepto al la invito de la Organiza Komitato.

SEPTEMBRO-DECEMBRO 1966

60-a Jaro

N.º 630-633

BRAZILA ESPERANTISTO

("O Esperantista Brasileiro")

Oficiala organo de

BRAZILA ESPERANTO-LIGO

Societo de publika utileco, laŭ registara

dekreto N. 4356, 26 Oktobro 1921

Direktoro:

A. CAETANO COUTINHO

Respondeca redaktoro (redactor principal):

D-ro CARLOS DOMINGUES

Administracio kaj Redakcio:

Praça da República, 54, 2.º

Telefono: 42-4357

Sidejo de la Brazila Societo de Geografio

RIO DE JANEIRO — BRAZIL

Senpaga por anoj de **B. E. L.**

Eksterlande: 18 steloj aŭ 15

respondkuponoj

QUOTA ANUAL DE ADESAO A LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

(De acordo com os Estatutos todos os membros são automaticamente filiados à organização mundial)

Membro simples: recebe a carteira de sócio, os cupões de serviço e o "Brazila Esperantisto"	6,00
Membro com direito ao Anuário: recebe o mesmo que o antecedente e mais o Anuário do movimento esperantista	20,00
Membro Assinante: recebe o mesmo que o antecedente e mais a revista "Esperanto"	30,00
Membro Mantenedor: recebe o mesmo que o Membro Assinante	50,00
Patrono: recebe o mesmo que o Membro Assinante e paga 10 vezes a quota deste.	
Membro Vitalício: recebe o mesmo que o Membro Assinante e paga 20 vezes a quota deste.	

Tôdas as importâncias devem ser remetidas em cheque pagável no Rio de Janeiro à

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

PRAÇA DA REPÚBLICA, 54, 2.º

Rio de Janeiro, GB

EXPRINTER — SOCIEDADE ANÔNIMA — (Turismo e Câmbio)

52.º CONGRESSO UNIVERSAL DE ESPERANTO

Tel-Aviv, Israel — 2/9 Agosto 1967

Oferece tôdas as facilidades e experiência de mais de 50 anos em viagens e turismo à todos os possíveis interessados.

- Passagens aéreas ou marítimas, segundo o roteiro solicitado pelo participante.
- Mandar trazer tôdas as informações que desejarem sobre o evento, seja científico ou social.
- Elaborar programa de viagem de turismo pela Europa, antes ou depois do Congresso, podendo ser aéreo ou terrestre, incluindo, hotel, passeios, refeições, e transportes entre as Cidades com assistência tanto nas chegadas como nas partidas e podendo ser em grupos ou individuais, e o regresso também por via E.E.UU. e Canadá, onde se realiza este ano a EXPO' 67 Exposição Universal.
- Câmbio monetário para viagem.
- Completa documentação de viagem.
- Para os interessados de outros Estados, dispõe de Escritórios em São Paulo e Porto Alegre, e correspondentes oficiais por todo o Brasil que os atenderão com a sua assistência.

Av. Rio Branco, 57-A — Telefone 23-1909 — Caixa Postal 1.502.

BRAZILA ESPERANTISTO

60-A JARO

SEPTEMBRO-DECEMBRO 1966

N.º 631-633

ASSOCIAÇÃO UNIVERSAL DE ESPERANTO (U.E.A.)

AOS QUE NÃO SÃO MEMBROS INDIVIDUAIS DA U.E.A.

Sabe o prezado consócio que, sendo membro de uma organização esperantista nacional filiada à U.E.A., é membro da U.E.A.. Isso significa que o sócio participa do movimento esperantista mundial e o sustenta. A situação de membro lhe dá o direito de usar os serviços dos delegados da U.E.A. Pode pedir, por escrito, informações a qualquer cidade estrangeira, e o delegado local é obrigado a responder-lhe. Também viajando pelo exterior pode pedir, pessoalmente ou por telefone, informações a um delegado, que as dará com prazer. O signatário verificou, várias vezes o valor dessa possibilidade.

Mas para utilizar os serviços de um delegado, é preciso tomar emprestado, de alguém que seja membro individual da U.E.A., o anuário da Associação, isso porque, sendo membro da U.E.A. somente por intermédio da organização nacional, o sócio não possui o anuário com os nomes e endereços dos delegados.

No jornal esperantista nacional certamente se pode ler alguma coisa do movimento esperantista mundial, e das atividades e acontecimentos internacionais; mas o periódico nacio-

nal, naturalmente, só em parte pode conter essas notícias. Se o esperantista realmente deseja esgotar as possibilidades que sua condição de sabedor da Língua Internacional lhe oferece, é preciso que assine a revista "Esperanto" e possua o anuário da U.E.A.. Em outras palavras, deve tornar-se um Membro-Assinante da U.E.A.

A quota de MA está indicada na tabela de adesão que aparece nesta revista. Basta enviar a importância à Liga nacional.

Todos os diretores da U.E.A. ficarão contentes com sua adesão como membro individual, e eu, diretor de finanças da U.E.A., ficarei mais alegre ainda, pois é claro que a impressão de, por exemplo, mais 1000 exemplares do jarlibro e da revista, não aumentará muito as despesas da U.E.A. e, portanto, com maior número de membros individuais, poderá a U.E.A. resolver seus problemas financeiros.

Leitor dêste artigo, eu lhe dou, antecipadamente, as boas vindas como membro individual da U.E.A.!

E. J. Woessink, diretor de finanças da U.E.A.

ESTU INDIVIDUA MEMBRO DE NIA MOVADO

BRAZILA KRONIKO

MINAS GERAIS

Além Paraíba — Sukcese finis elementan kurson kaj ricevis diplomojn de B.E.L. 5 lernantinoj, sub la gvidado de nia samideano Antonio Lopes de Oliveira Filho. Por la transdono de la diplomoj okazis, la 26-an de Junio lasta, soleno en kiu parolis niaj samideanoj Mauricio Santiago Couto, direktoro de la Departamento de Esperantista Lernado kaj Disvastigo ĉe Spirita Centro "Amo al Dio", Antonio Lopes de Oliveira Filho, kursgvidanto kaj Edmar Silveira Luz, direktoro de la Departamento de Esperanto-Diskonigo.

Araxá — Grupo da simpatiantoj de la Internacia Lingvo sub la gvido de nia samideano S-ro Sebastião Alves Moreira fondis Esperanto-grupon, kiu provizore funkcios en la sidejo de la loka Kontraŭalkohola Asocio. La estraro jam faris la necesajn kontaktojn kun B.E.L. por la enskribigo de siaj membroj en Esperanto-kurson per korespondado.

Coronel Fabriciano — S-ro João Inácio Fernandes, tre agema esperantisto, donis la nomon Esperanto al sia magazeno, en avenuo Magalhães Pinto. Li instruis Esperanton al siaj 5 infanoj kaj entreprenis sisteman laboron de diskonigo de la idiomo per disdonado de libroj kaj informaj broŝuroj. Nun li diligente faras nian Superan Kurson.

Uberlândia — De la 9-a ĝis la 12-a de junio efektiviĝis la 1-a Brazilia Kongreso de Lernantoj de Esperanto, kun la ĉeesto de samideanoj el la

tuta lando. Organizis la kongreson Prof. Euler Lannes Bernardes kaj D-ro Carlos de Almeida Wutke.

GUANABARA

Rio de Janeiro — Ĉe TV-Rio la konata kantistino Franca Senafi plaĉe kantis en Esperanto, en la 31-a de Majo lasta, la kanzonon "Iru al Infero" (*E que Tudo Mais Vá Para o Inferno*) de Roberto Carlos kaj Erasmo Carlos en traduko de Prof. Sylla Chaves.

SÃO PAULO

Santo André — Ekfunkciis elementa kurso de Esperanto, sub direktado de d-ro Cicero Pimentel, fakdelegito de U.E.A.

Sorocaba — Nova esperanta grupo estas fondita. Radio Sorocaba regule elsendas esperanto-programon, ĉiudimane, de 9:30 ĝis 10 vespere. Frekvenco: 1080 kilocikloj; kursgvidantoj: Silvestre Bego kaj Manoel B. Garcia. La supraj sciigoj klare montras la viglecon de nia movado en Sorocaba.

PARANÁ

Curitiba — La 24-an de aprilo estis elektita la nova estraro de Paraná Esperanto — Asocio, por la periodo 1966/1968: Honora-Prezidanto: Augusto Gonçalves de Castro; Prezidanto: Gert Drucker; Viceprezidanto: D-ro Francisco Soares Portugal; 1-a. sekretario Leonidas Silva; 2a. sekr. Walmor Silva; Kasistino: Natalina Silva; Bibliotek. Hermanito Christensen.

Maringá — La 16-an kaj 17-an de julio okazis en Maringá la 12-a Renkontiĝo de la Esperantistoj de Stato Paraná. Interalie oni decidis sendi petskribon al la Sekretariejo de Edu-

PLENA VORTARO DE ESPERANTO

Formato pequeno Cr\$ 12.000
Formato maior Cr\$ 18.000

APERFEIÇOE O SEU CONHECIMENTO

LA KATEDRALO KAJ LA PRAARBARO

Carlos Porto Carreiro

La temploj kristanaj simboligas la kristaligon de la kredo en la nemortema kaj majesta ŝtono, — la vivado de granda homo estas la elokventa sintezo de ĉiuj aspiroj kaj de ĉiuj grandanimaj revoj siatempe.

La katedralo estas la praarbaro de la unuaj epokoj de la kristanismo, transformita en marmoro kaj grinito, per la venko de la kredo, komen-

kado de Paraná, pledante la enkondukon de Esperanto en ŝtatajn gimnaziojn.

Ponta Grossa — Estas starigita elementa kurso de Esperanto ĉe "Centro Cultural "Vieira de Alencar", neesperantista junulara organizajo. Prizorgas la kurson nia samideano Ennio José Toniolo.

RIO GRANDE DO SUL

Santa Maria — Per iniciato de S-ro Oscar Willybaldo Einloft kaj sub la gvido de S-ro Carlos Henrique Dionísio, el São Leopoldo okazis ĉe "Departamento de Ciência e Cultura da Aliança Espirita Santamariense" bone vizitata kurso de Esperanto, kiu finiĝis per ekzameno en la 26-a de Julio de la kuranta jaro. Estis aprobitaj kaj ricevos la Elementan Diplomon 33 lernantoj, kies nomoj aperos en la listo publikigota en nia plej proksima numero. Sinceran dankon al la nomita institucio kaj al la aliaj kunlaborantoj, kaj koran gratulon al la novaj esperantistoj.

ce de la mezepoko: ĝi estas la praarbaro, kie la trunkoj de la centjaraj arboj fariĝas puntaĵoj kolonoj, — kie la maldensejo ombrita de la branĉetaro fariĝas la navo solena, — kie la tutaĵo de la foliaro en la altaj suproj fariĝas la volbo senĝena, kiu intermite de la folioj pasigas la sunan lumon tra la malfermaĵoj de la konstruo.

La potencoj de la naturo estas imitataj de la kuraĝo de la homoj, kaj se ĝi levas al la supro la rapidajn trunkojn de la poploj kaj pinoj, la arkitekto — pasante aŭdace de la galerio al la arkaĵo kaj de la arkaĵo al la ogivo, — levas en la ĉielon, kvazaŭ li levus sian animon, la kuraĝegecon de preĝejaĵ turoj.

Ne mankas al ĝi — al tiu mirinda arbaro — la tufoj de foliaro de la akantoj, la graciaj arbitoj de la kolonoj kaj la branĉoj, kiuj trapasas en la aero kvazaŭ pontoj, — la apogarkajoj riskemaj.

Ne mankas al ĝi la kardoj, urtikoj, dornoj, kaj la rozoj enmiksigaĵoj en la blankaj branĉoj de la flankaj montoj, grimpantaj kaj florantaj, supraĵe de la trunkoj, ĝis finiĝo per riĉega infloresko.

Ne mankas al ĝi la animala vivado, multaspekta, varia kaj stranga: fantaziaj serpentoj sigzagas, ekkuregas noktuoj eksterordinaraj, malkaŝiĝas, pendantaj en la ombro, teruraj demonoj...

Kaj la katedralo antaŭsentas la vivon, ekstreman sonante, resonas harmonie, kiam la sonorilturo — bronza voĉo de la jarcentoj — kaj la orĝeno — kristala voĉo de la kredo — kunvokas homojn kaj koncentrigas animojn en la mistera ventrego de la arbaro.

(*Peco de parolado memore de Joaquim Nabuco*).

Trad. C.C.

ESPERANTO NO ESTRANGEIRO

Áustria — Alguns esperantistas, historiadores e estudiosos de História, fundaram em Viena, em janeiro deste ano, o Grupo Internacional de Historiadores (Internacia Historiista Fakgrupo), com a finalidade de realizar e publicar estudos sobre História, na Língua Internacional. Os interessados em colaborar devem escrever para: Dr. E. J. Görlich, Postfach 70, 1094 Wien, Áustria.

No mês de julho realizou-se em Graz, 2.^a Conferência das Escolas onde é ensinado o Esperanto. O certame foi promovido pela Organização Mundial da Juventude Esperantista.

Colômbia — Na cidade de Cartagena foi fundado um clube esperantista, sob a direção do sr. Gilberto Toro Garcia, Diretor da Estação de Piscicultura do "Departamento de Investigaciones Ictiológicas y Faunísticas."

Dinamarca — O Congresso Anual dos Esperantistas Dinamarqueses realizou-se, este ano, na sede do Parlamento da Dinamarca (Castelo Christiansborg). Essa notável demonstração de prestígio do movimento esperantista foi ainda confirmada pela participação, no congresso, de altas autoridades dinamarquesas; entre elas o prefeito de Copenhague, Urban Hansen, e o Ministro da Cultura, Hans Solvhoj.

Inglaterra — De 27 a 30 de maio, realizou-se em Norwich, Norfolk, Inglaterra, o 50.^o Congresso Inglês de Esperanto, um dos mais importantes da história do movimento naquele país.

Uruguai — desde 1965 a Associação Uruguai de Esperanto está publicando a revista "Kemio Internacia" (Química Internacional), sob a direção de Alberto Barrocas. É uma publicação de alto nível, apresentando uma seleção de artigos de renomados especialistas internacionais de Química, com texto em Esperanto e resumos nos idiomas de origem. Pela importância que tem, no desenvolvimento da literatura técnica da Língua Internacional, "Kemio Internacia" merece o apoio incondicional dos esperantistas, que devem procurar divulgá-la em nossos colégios, bibliotecas e universidades.

CINQUENTENÁRIO DA MORTE DE ZAMENHOF

Em 14 de Abril do ano próximo futuro transcorrerá o quinquagésimo aniversário da morte do Dr. L. L. Zamenhof.

A data será lembrada em todos os países em que existe o Movimento Esperantista.

No Rio de Janeiro a Liga Brasileira de Esperanto, em colaboração com o Brazila Klubo Esperanto, realizará um programa de comemorações, e em várias outras cidades haverá também celebração.



Casa Esperanto (Magazeno Esperanto) en Coronel Fabriciano, Minas Gerais. La proprulo, nia samideano S-ro João Inácio Fernandes, aperas en la foto kun sia familio.

(Volonte B.E. publikigas fotojn de entreprenoj kun la nomo Esperanto aŭ Zamenhof.)

SOCIA VIVO

Nia samideano Prof. Pedro Real kaj edzino, el Paranavaí, Paraná, feliçe havis en la 15-a de Julio lastasian dudekkvinjaran edziĝofeston. Koran gratulon!

REGISTRO DE PROFESSORES DE ESPERANTO

A propósito do importante assunto do registro de Professores de Esperanto no Ministério da Educação e Cultura, escreveu-nos o nosso ilustre samideano Prof. Francisco Corrêa Neto, diretor do Colégio Lara Vilela, de Niterói, e grande batalhador pela introdução do ensino da Língua Internacional nos ginásios brasileiros, o ofício que transcrevemos e para o qual pedimos a atenção dos nossos leitores:

“Ao Ilustríssimo Senhor Professor Doutor Carlos Domingues, DD-Presidente da Liga Brasileira de Esperanto.

Senhor Presidente!

Junto estamos remetendo a Vossa Senhoria a relação dos documentos necessários para a obtenção do Registro de Professor (no caso do Esperanto) no Ministério de Educação e Cultura, através do Exame de Suficiência, e que esperamos venha a interessar os Esperantistas num todo.

O Exame de Suficiência é realizado através das Inspetorias Seccionais de Ensino Médio, nas Capitais, para atender as necessidades de cada Estado, nas seguintes condições: nos locais onde não há Faculdade de Filosofia; quando a matéria não existe na Faculdade de Filosofia local; ou quando o número de diplomados por essa Faculdade é insuficiente diante da demanda local. O Esperanto se enquadra perfeitamente no segundo caso.

ELEKTITAJ PAROLADOJ KAJ PRELEGOJ

Discurso e preleções do famoso orador Prof. Dr. *Ivo Lapenna*, presidente da U.E.A. e membro da Academia de Esperanto. Magnífico material para documentação, informação e argumentação Cr\$ 13.800

É já conhecido de todos os Esperantistas que um número sempre crescente de educandários vêm introduzindo o Esperanto em seus currículos e é preciso que os respectivos professores e todos aqueles que desejam lecionar o Idioma Internacional estejam munidos do competente Registro. Mas até agora o Diploma expedido pela Liga não é oficialmente reconhecido pelo M.E.C. Mas é preciso que forcemos êsse reconhecimento. Por exemplo, os Diplomas expedidos pela Aliança Francesa, Cultura Inglesa e Brasil-Estados Unidos têm oficialmente o valor de Diploma de Bacharel perante o M.E.C., bastando os seus portadores fazer o Curso de Didática (um ano) na Faculdade de Filosofia para obter o Diploma de Licenciado para lecionar regularmente. É preciso que o Diploma da Liga tenha o mesmo reconhecimento, mas isso só virá quando um grande número de Esperantistas demonstrarem que são necessários no magistério.

Apresentados os documentos à Seccional de cada Estado, esta expede, na hora, uma Autorização Provisória, para lecionar por um ou dois anos, renovável se a Seccional não realizar o Exame de Suficiência. Êsse exame, logicamente, só será realizado se houver um número de candidatos que justifique a organização de uma Banca Examinadora, e tudo o mais. Havendo candidatos, havendo Exame de Suficiência, o Registro fornecido tem o mesmo valor que aquele expedido pelas Faculdades de Filosofia. Ainda, o número de candidatos sendo anualmente grande, o Ministério será forçado a considerar o Esperanto como uma realidade e o Diploma da Liga em igualdade de condições com o da Aliança Francesa, etc.

Quantos aos documentos relacionados nos itens 1, 4, 5, se o candidato der entrada nos papéis por Niterói, o Colégio Lara Vilela os fornecerá.

Aproveitamos o ensejo para reiterar a Vossa Senhoria protestos de admiração e apreço.

Francisco Corrêa Neto

Diretor do Colégio Lara Vilela
Trav. Manuel Continentino, PE-31
Niterói, RJ

P.S. — Caso seja possível, solicitaria que tal assunto fôsse publicado no próximo número de *Brazila Esperantisto*.

**VAMOS TODOS OS ESPERANTISTAS
REQUERER SEU REGISTRO DE
PROFESSOR DE ESPERANTO?**

**RELACÃO DOS DOCUMENTOS NECES-
SÁRIOS PARA AUTORIZAÇÃO PARA
LECIONAR (ESPERANTO)**

- 1) Requerimento ao Senhor Inspetor Seccional do Ensino Médio, solicitando sua inscrição no Exame de Suficiência de Esperanto e solicitando, até, então, Autorização Provisória para lecionar;
- 2) Documento de Conclusão do 2.º Ciclo ou equivalente;
- 3) Prova de maioridade;
- 4) Declaração de contrato, assinada pelo Diretor da escola;
- 5) Atestado de idoneidade moral, assinado por dois professores, anotados os respectivos Registros;
- 6) Fotocópias da Carteira de Identidade e do Título de Eleitor;
- 7) Atestado de Sanidade Física, Mental e de Vacina;
- 8) Fotocópia do Certificado de Reserva;
- 9) Fôlha Corrida;
- 10) Certidão de gozo de direitos políticos, expedida pelo Tribunal Eleitoral;
- 11) Fotocópia de Diploma expedido pelo Liga (se o candidato o possuir — não é obrigatório).

Firmas Reconhecidas e Autenticação

52.º KONGRESSO UNIVERSAL DE ESPERANTO

Na semana de 2 a 9 de Agôsto de 1967 realizar-se-á, em Tel-Aviv, Israel, o 52.º Congresso Universal de Esperanto, sob o alto patrocínio do Presidente da República, Sr. Zalman Shazar.

51-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Delegito de Brazilo

Sekve de peto de B.E.L. la Ministerio por eksterlandaj aferoj nomis por reprezenti Brazilon en la 51-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Budapeŝto, Hungarujo, Sron Sekretarion Caio Mario Caffé Nascimento.

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

Em Assembléia Geral Ordinária, realizada em 30 de Abril último, B.E.L. aprovou por unanimidade, o Relatório da Directoria e as Contas da Tesouraria, referentes ao ano de 1965.



En Além Paraíba, Minas Gerais, okaze de la festo por la disdono de diplomoj, la diplomitinoj kaj gvidantoj staras antaŭ la memoriga kuko, bele ornamita per la verda stelo. (Teksto en Brazila Kroniko.)

PREFIXOS, SUFIXOS, PREPOSIÇÕES, ETC. SERVINDO DE RADICAIS E PALAVRAS FORMADAS PELA COMBINAÇÃO DÊSSES ELEMENTOS

Manoel Alves Carneiro

(continuação)

III — COMBINAÇÃO DE PREFIXOS, SUFIXOS, PREPOSIÇÕES ETC. ENTRE SI

ALIĜI — (al - iĝ - i), aderir. Ex: *Eĉ unu kotero ne volis aliĝi al la peka korpo* (Z. F.K. pg. 60)

ANARO — (an - ar - o), reunião de membros, exército. Ex: *Baldaŭ komen-cis kolektiĝi la anaro de la malgranduloj* (Z. G. pg. 62)

ANSTATAŬULO — (anstataŭ - ul - o), substituto. Ex: *Ke ili havas por mi anstataŭulon* (K. Far. II pg. 102)

ANTAŬAJO — (antaŭ - aĵ - o) parte da frente. Ex: *Sur la antaŭaĵo de la lokomotivo* (Z. F.K. pg. 131)

ANTAŬULO — (antaŭ - ul - o), antecessor. Ex: *Kaj ofte heredita de la antaŭuloj* (K. UL. pg. 61)

ARETO — (ar - et - o), grupinho. Ex: *Li rimarkis areton da virinoj* (K. Far. I pg. 111)

ĈIRKAŬAJO — (ĉirkaŭ - aĵ - o), cercanias. Ex: *En la tuta ĉirkaŭaĵo oni rakontis pri* (K. UL. pg. 34)

DISIĜI — (dis - iĝ - i), separar. Ex: *Kaj mi petas vin disigi min de edzo* (Z. G.D. pg. 49)

DISIĜI — (dis - iĝ - i), separar-se. Ex: *Ni disiĝu* (Z. G.D. pg. 41)

DISIĜO — (dis - iĝ - o), separação. Ex: *Mia filino, tiaj disiĝoj ne povas esti jarataj sen granda skandalo* (Z. G.D. pg. 49)

EBLECO — (ebl - ec - o), possibilidade. Ex: *Se mi iam havos la eblecon* (Z. I.T. pg. 98)

EBLIGI — (ebl - ig - i), possibilitar. Ex: *Kaj ili volonte al li ebligas ĝui kelktempe* (Z. I.T. pg. 29)

ELIĜI — (el - iĝ - i), sair. Ex: *El kiu ili ne eliĝis plu* (K. UL. pg. 34)

NEKROLOGO

Acyr de Carvalho

En São Paulo, la 12-an de Januaro de la kuranta jaro, mortis nia sindona samideano Acyr de Carvalho. Li laboris por Esperanto en tiu urbo, kie li instruis la Internacian Lingvon. Dum jaroj li estis membro de nia Movado.

Irene de Araujo Monzon Abril

En la 20-a de Majo lasta mortis en Rio de Janeiro nia samideanino Sino Irene de Araujo Monzon Abril. Ŝi regule ĉeestis la kunvenojn de la loka grupo, Brazila Klubo Esperanto, kie ŝi ofte deklamis siajn poeziaĵojn. Volante regi nian lingvon ŝi vizitis la Superan Kurson kaj ricevis la koncernan diplomon. La estraroj de B.E.L. kaj de B.K.E. ĉeestis la funebrian meson kaj kondolencis la familon.

ENIGI — (en - ig - i), introduzir. Ex: *Sed enigu malgrandan puran signeton* (K. UL. pg. 59)

EKSIGI — (eks - ig - i), demitir. Ex: *... Petis Aŭguston eksigi lin de la servo* (Z. F.K. pg. 59)

EKSTERAJO — (ekster - aĵ - o), aspecto, aparência. Ex: *En la majesta nobla eksteraĵo* (Z. Haml. pg. 4)

ERETO — (er - et - o), partícula pequena. Ex: *Por ke nenia ereto de fermentinta pano restu sur ili* (Z. Rb. página 38)

ESTRARO — (estr - ar - o), chefia, diretoria. Ex: *La estraro havas konsiderojn* (Z. R. pg. 6)

ESTRECO — (estr - ec - o), chefia, direção. Ex: *Kiuj estas sub via estreco* (Z. R. pg. 6)

ETULO — (et - ul - o), ser pequeno. Ex: *En kiu kuŝas ĉiuj homaj etuloj* (K. UL. pg. 75)

(continua)

PLUVEGO SUR MIZERO

(La ŝatata revuo *LA PRAKTIKO*, eldonata de U.E.A., en la numero de Majo lasta aperigis, kun tri bildoj de Rio de Janeiro, artikolojn de niaj samideanoj Prof-ino Maria Helena de Oliveira Kühner kaj S-ro Alfredo Ferreira da Costa e Silva pri la inundo en Rio de Janeiro en Januaro de la kuranta jaro. Ni transkribas tiujn artikolojn.)

Maria Helena de Oliveira Kühner

"FAVELA"

"Favela"... vorto, fremda al tiu kiu neniam vidis la aglomeritajn domaĉarojn, kiuj plenigas la deklivojn de multaj montoj en Rio-de-Janeiro. kaj grupigas 5000 ĝis 30000 loĝantojn. Ekzemple: Mangueira, unu el la plej konataj domaĉaroj, estas rifuĝejo de ĉirkaŭ 12000, dispartigitaj aŭ, plibone dirite, amasigitaj en 2600 kabanoj.

Kiel aperas la domaĉaro?

Persekutataj de la malfacilaĵoj akiri vivrimedojn — pro la kampara strukturo ankoraŭ duone kolonia — la kamparanoj estas allogitaj de la "granda urbo" kaj amase translokiĝas al ĝi, serĉante favorajn laborkondiĉojn.

Tie ĉi regas kruda konkurenco, nesufiĉeco de ofertoj kaj ekcesa serĉado de okupo. La salajroj estas ja iom pli bonaj ol antaŭe, sed tiu malgrandega plibonigo ilin konservas ligitaj.

Ili loĝejo? "Barraco", nomo de mizera budo, amaso de ladoj, tabuloj, pecoj de zinko kaj kartono, fiksitaĵ unu ĉe alia, montrantaj originalan mozaikon kaj formantaj ĉambron (2 x 2 metroj) kiu permesas stari, kaj ankaŭ lignaj dometoj faritaj per larĝaj tabuloj, ligitaj unuj al la aliaj, kiujn luas aŭ vendas kelkaj industriuloj. Tiamaniere ekaperas la "favela". Ĝi aperas kaj sin reproduktas, donante al la urbo konstantan vidaĵon de malriĉeco.

POR DEVIGI LA GUBERNION AGI

Sed unu tagon... "laŭŝajne, laca vidi la mizeron de tiu popolo, Dio decidis detrui la monton, por devigi la gubernion agi", saĝe diris unu el la domaĉaraninoj. Kaj

post intensa varmo dum multaj tagoj, komencis pluvi abunde, kontinue, per timemiga maso. La stratkanaletoj ne malplenigas la torenton, kaj la stratoj restas inunditaj.

Tre okupita pro la interrompiĝoj kaj malfaciloj de la telefonaj linioj, traveturado, lumo kaj gaso-kondukiloj, k.a., la loĝantaro ne atentis pri la tera tavolo duonsableca, kiu kovras la rokecajn montojn ĉirkaŭantajn la urbon kaj glitas, komence malrapide kaj nebrue, nur videbla pro la sinsekvaj tavoloj da koto, kiuj amasiĝas en la defluiloj...

Tiam komencas aperi nova vorto en la informfakoj: disfalo. Ripetade, plue kaj plue: unu domo, du barakoj, tri familioj enterigitaj... Kaj la nombro kaj proporcio terure pligrandiĝas: polico, fajrestingistoj, ĉiuj oficoj estas mobilizitaj por evakui la danĝerajn lokojn kaj malebligi novajn mortojn.

La nombro de tiuj, kiuj perdis sian ŝirmejon, kreskas.

Hospitaloj, publikaj lernejoj kaj aliaj konstruaĵoj de la registaro postulitaj, komencas pleniĝi je vestohokoj, dum la radio kaj televido klopodas petante de la popolo helpon pri transportiloj, nutraĵoj, vestoj, medikamentoj, fine ĉion, kio montriĝas necesa por tuja helpo al tiuj, kiuj foriras el siaj barakoj aŭ estas eltrinitaj el ili, nur kun la vesto tiumomente uzata. Tiu kvanto pliiĝas pli kaj pli, tiamaniere ke lernejoj, kluboj kaj aliaj privataj asocioj malfermas siajn pordojn.

La samo okazis al nia kolegio, tra kies pordo eniras la malfacilaĵoj de tiuj domaĉaranoj. Kiel priskribi ilin al tiuj, kiuj neniam havis okazon vidi tion? Ili venadas el ŝarĝveturiloj de la polico, de la armeo aŭ de privatuloj, kiuj renkontas ilin ankoraŭ proksime de iliaj loĝejoj, kie ili staris senhelpe, preskaŭ senkonscie, kun idoj en la brakoj aŭ alkröĉitaj al iliaj kruroj.

En la viclinioj formitaj por la enira registro, ĉiuj fizionomioj havas la saman

PLENA GRAMATIKO DE ESPERANTO

I Vol.	Cr\$ 12.000
II Vol.	Cr\$ 15.000

markon: la ekteruro, pliigante la okulojn de ĉiuj infanoj eke de la kvarjaraĝa knabineto, kiu, dum la nokto eltirita el la ruboj de sia domaĉo, ankoraŭ ripetas, alĉroĉita al la patrino jupo, nur la vortojn: "ĝi falas, ĝi falas, panjo!" al la aliaj, kiuj malproksimiĝas terurita, eĉ pro la mano, kiu al ili estas etendita kiel milda kareso. La plenaĝuloj etendas la rigardon malproksimen kun silenta demando, kiu igas ilin eniri kaj sidigi per aŭtomataj gestoj sur la matracoj metitaj sur la planko kaj tie resti indiferentaj por ĉio, kio ilin ĉirkaŭas.

Eĉ post jam organizita horartabelo de la deĵoro pri la ĉambraro. tolaĵoj. k.c., post distribuo inter ili mem de la plimulto de taskoj, por eviti tiun inertecon al kiu ili sin tute donis. la zorgoplena demando montriĝas en ĉiuj dialogoj:

KIO FARIGOS EL NI?

Kaj la psikologiaj reagoj aperas. tiom diversaj kiom la individuoj, kiuj ilin esprimas: pasiva rezigno de tiu, kiu akceptas la vivon kiel signita ĉiam per tragika. fatala stampo; la honto troviĝi preskaŭ en almozula situacio, akceptante de aliaj personoj manĝaĵon kaj vestojn; la espero reakiri parton de tio perdit. aŭ reveni al la antaŭa loĝejo. Precipe, la indignosento sen difinita signifo, kaj ne klarigita per faroj. sed evidente pri la instigo kun kiu oni kritikas la proprajn kondiĉojn de vivado. la sociajn diferencoj, la malutilon de la peno kaj laboro, aŭ malsparante senkonscie la tempon per bagateloj, kiel ekzemple: "la vesto, kiun la alia gajnis, estis pli bela": aŭ per incitado de kverletoj pro senvaloraj motivoj...

Iu viro, en la aĝo de 44 jaroj. ekscianta ke la kuracistoj, kiuj ekzamenas la rifuĝintojn, konstatis ke lia trijaraĝa filo suferas pneŭmonion, en malsanulejo, post silento dum kelkaj minutoj simpla nime diris: — Vere, sinjorino... Mia edzino frenezigis kaj mortigis mian pliaĝan filon; la tri aliaj ankaŭ mortis; restas nur tiu... se li ankaŭ mortos... ĉio finiĝis por mi".

Kaj ni ankoraŭ estas ŝtoniĝintaj antaŭ tiu "ĉio finiĝis", kiu klare prezentas lace-plenan vivon, kiam ni vidas la mondon tuj rekomenci en la okuloj de 3-jara infanino, kiu gajnas, dum disdono de ludiloj, sian unuan pupon, kaj ĝin

Enviando fotografia, não deixem de indicar no verso a data e o lugar do fato.

As notícias, se mandadas com o jornal inteiro, devem assinalar a página e indicar claramente o texto; se vier somente o recorte, mencione-se o título da publicação e a data.

konservas levita antaŭ ŝiaj okuloj, kun patrino ravo..

Alia virino, kun sep gefiloj, ĉe angulo, petas konfuze, heziteme, ĉu ŝi povus, "kiam ŝi trovos denove hejmon, kunporti la larĝan, sendifektan matracon, kiun ŝi ricevis, ĉar ĉiam ŝi deziris posedi unu similan matracon!"

Apogita al la blanka muro de la korto, kun infaneto en la brakoj, du okuloj sur brila juna vizaĝo montris gojon, vidante la fileton (du jaroj kaj duono), kaj aŭdante lian voĉon distingiĝi inter la amuzajoj kaj ludoj organizitaj de la vartistinoj kiuj kunordigas kaj kontrolas la infanojn. Ŝia edzo ŝin forlasis, kiam ŝi baldaŭ devis akui la trian idon. Ŝi estas gladistino, kaj povas porti al la ejoj, kie ŝi laboras, nur la lastan, naskitan antaŭ unu monato. La aliaj restas ĉiam hejme, solaj. Ŝi ŝlosas la pordon kaj ili restas malantaŭ la fenestro, rigardante aliajn knabojn ludi sur la strato..

Kaj la okazaĵoj sekvas. ĉi kun propra karaktero, sed kvazaŭ klarigo de la kondiĉoj pri la vivo de tiu homa grupo, kiu kontribuas en nia ŝtato al la "du triono de la homaro, kiu malsatas, por ke la triono restanta povu vivi ricege..."

Tiam montriĝas gravaj aspektoj de la tuta situacio; malgraŭ la "plialtiĝo de la popolamasoj", kiun la historio montras kiel unu el la esencaj atingoj de la jarcento, la sociaj klasoj konservas ankoraŭ inter ni precizan distingigon. Por la plimulto de la meza klaso, izolita en sia privata vivo, nesciante ĉiujn sociajn problemojn, la "favelas", kiujn ili nur rigardis de malproksime, tra la fenestroj de siaj altaj loĝejoj, estis simple plia aspekto de la pejzaĝo, senigita de la primitiva kreskajaro de kelkaj urboj kaj donanta novan vigligon per la pleningo de budoj...

SPONTANEA HELPO

La naturo montras subite, nerefuteble, antaŭ ĉiuj okuloj, la malcertecon de ĝia kondiĉo kaj la senlimon de ĝia mizero. Per spontanea movo de tiuj, kiuj donas al ni "fieron esti homo kaj esperon pri la feliĉo de la gento", laŭ tio kion skribis unu el niaj plej bonaj romanverkistoj, Lima Barreto, ili tute sin donas por helpi kaj servi ĉiujn laŭ plena povo.

Tiamaniere, la nombro de personoj, kiuj sin prezentas al nia kolegio, por labori, estas tiel granda, ke per nur unu triono de ili oni formis personaron por la diversaj servoj (malsanetejo, vestogardejo, nutrado k.a.), alternante kvar fojojn dum la tago (24 horoj). La kvanto da vestoj kaj nutraĵoj ebligas al ĉiuj porti, kiam ili foriras de la kolegio, pakon da nutraĵoj por tri semajnoj (por 53 infanoj ni ricevis 840 skatolojn da pulvorigita lakto...)

Infanoj serioze malsanaj, kiuj ne trovis vakantan lokon ĉe proksimaj hospitaloj, estas portitaj de najbaraj sinjorinoj al iliaj loĝejoj, sub ilian zorgon...

KRUELAJ RIMARKOJ

Al observanto pli atenta evidentiĝis ke la dolora realo de tiuj mizeraj vivantoj, reliefigita sekve de la katastrofo, tiamaniere kortuŝis, ke al kelkaj montriĝis la neceso nei ĝin. Kaj ne maloftaj estis la kruelaj rimarkoj pri la "favelas", kiel:

— "Ilia situacio estas nur rezultato de nekapableco kaj malklereco"... aŭ: "al tiuj individuoj nenion konvenas fari..." aŭ ankoraŭ: "ili estas malbonedukitaj kaj nedankemaj... morgaŭ ili returne iros!", ktp.

Post la pluvego, vidante ke la plimulto de ili revenas al la antaŭaj ejoj aŭ al aliaj en samaj kondiĉoj, aŭdante tiajn rimarkojn ni pripensis malgaje, ke tiu okazaĵo, same kiel tiom da aliaj, fariĝos post nelonge forgesita, sekve de la nelacigebla kuro de la tempo. Kaj ni daŭrigos adopti la paradokson, dum epoko faranta la konkeron de la spaco kaj de akcelata progreso de la Scienco kaj Tekniko, — stari sur dua plano de la pli granda konkero — tiu de la Homo — kiu nur povas okazi kiam sur ĉiuj regionoj de la Tero la homoj vivados en kondiĉoj... humanaj.

LA RADIAMATOROJ KAJ LA KATASTROFO EN RIO DE JANEIRO

Nia nembro kaj fakdelegito pri radiamatorismo S-ro Alfredo Ferreira da Costa e Silva, PTICJL tiel informas nin pri la katastrofo en Rio de Janeiro sekve de la pluvego, kiu dum tri tutaj sinsekvaj tagoj falis sur la grandan metropolon.

Tuj kiam la lokaj radiamatoroj eksciis pri la terura okazaĵo, kiu plenigis de angoro la 4-milionan loĝantaron, ili alkuris kun siaj stacioj por doni la eblan helpon al la viktimoj kaj por trankviligi parencojn kaj amikojn loĝantajn en la najbaraj urboj, en aliaj brazilaj ŝtatoj kaj eĉ eksterlande.

Tutaj familioj estis en malmulte da tempo sen tegmento ne povante trovi ŝirmejon pro manko de komunikiloj. Nia informinto kaj kelkaj el liaj amikoj per siaj stacioj penis mildigi la aflikton. Dum kvar sinsekvaj tagoj S-ro Costa e Silva restis ĉe televida stacio interŝanĝante mesaĝojn, sciigante pri la sorto de la suferantoj, plenumante petojn pri transporto, nutraĵoj, vestoj kaj ankaŭ provizora loĝado. Liaj radiamatoraj amikoj instalas sin en la favelas (domaĉaroj) mem, en la plej forte trafitaĵoj, ĉiam helpante kaj konsolante la viktimojn. En la monta komforta kvartalo Santa Teresa ekzemple, 60 familioj afliktitaj provis komunikiĝi kun siaj parencoj en Minas Gerais, por ke oni tie sciu, ke ili estas vivantaj kaj savitaj: efektive ili sin trovis izolitaj pro la rubo de la disfalintaj domoj.

Bonan servon faris do la sindonaj radiamatoroj!

KATALOGO DE ELEKTITAJ
LIBROJ EN ESPERANTO

Livro ilustrado, interessante para leitura e muito próprio para presente e propaganda.

Documento valioso para prova da vitalidade do Esperanto e de sua literatura Cr\$ 3.000

Remetendo dinheiro, use CHEQUE pagável no Rio de Janeiro à Liga Brasileira de Esperanto.